LA ANĜEVA FOLIO N° 29 **FEBRUARO 2014**

Centre Culturel Angevin d'Espéranto
www.esperanto-angers.fr

# LA ANĜEVA FOLIO
## LA FEUILLE ANGEVINE

**Rendez-vous le samedi 22 février 2014**
**ASSEMBLÉE GÉNÉRALE**
**à 14h, Centre Jean Vilar - Angers (quartier La Roseraie) avec la traditionnelle galette**

## Kelkaj vortoj

Ĉijare ni ne antaŭvidas grandiozan manifestacion, kiajn ni kelkfoje organizis en Angers. Ni daŭrigos nian formikan laboron por diskonigi kaj ŝatigi Esperanton al Anĝevanoj. Estas skipa laboro, mi fidas vin por paroli pri Esperanto kaj proponi la 2014-kalendareton al viaj amikoj kaj konatoj. Guton post guto dispecetiĝas granito.
Nome de nia komitato, mi deziras al vi kaj al viaj familianoj, feliĉon kaj bonfarton.

*Pierre Jagueneau, Prezidanto*

## Quelques mots

Cette année ne verra de grande manifestation comme nous en organisons quelquefois à Angers. Nous continuerons donc le travail de fourmi pour faire connaître et apprécier l' espéranto aux Angevins. Il s'agit d'un travail d'équipe, je compte sur vous pour parler de l'espéranto et proposer le petit calendrier 2014 à vos amis et connaissances. Goutte après goutte, le granite s'effrite.
Au nom du conseil d'administration, je vous adresse à vous et à votre famille, tous mes vœux de bonheur et de santé.

*Pierre Jagueneau, Président*




# Novan lampon funkciigas gravito

En pluraj urboj en Eŭropo kaj Usono, Petrollampoj estas ankoraŭ uzataj en malriĉaj, maldensaj regionoj sen elektroreto. Ili estas granda problemo. Ili malbonas por la sano de homoj kaj de medioj.



Nove fondita entrepreno proponas solvon kiu utiligas alian, pli verdan fonton de energio. Temas pri io da kio ni ĉiuj havas abundon: gravito.
Oni konstruis lampon kiu nomiĝas GravityLight. Ĝi donas lumon kontraŭ la potenco de gravito. Dum pezilo malrapide falas, ĝi tiras ŝnuron tra la mezo de la aparato kaj turnas turbineton. Tio konvertas la energion de la falanta pezilo en elektron por la lumo. Ĝi funkcias simile al poŝlampo kun mana turbineto.
Necesas nur kelkaj sekundoj por remeti la pezilon. Dum ĝi alteriĝas, generiĝas sufiĉa elektro por funkciigi la lampon dum tridek minutoj.
Kontraŭ nura relevo post ĉiu duonhoro, la lampo provizas konstantan ekologian senbaterian lumon.
Ankaŭ similaj aparatoj kiel bateriŝargiloj povus ricevi elektron per la sama metodo.
La inventistoj diras ke jam eblas vendi la aparatojn kontraŭ malpli ol dek dolaroj. Aĉeto do ŝparigus monon de aĉetinto ekde tri monatoj post malakiro de petrollampo.
La grupo jam pli ol atingis sian celon en investokampanjo, do ni espereble vidos realigon de la lampoj baldaŭ.

*(franca traduko paĝo 4)*
*(traduction en français page 4)*

*Fonto : Radioverda.com*



La dancistinoj kaj la gekantistoj

# La ZAMENHOFA TAGO en Le Mans

## dimanĉon 15an de decembro 2013

Sub blua ĉielo partoprenis tiun renkonton naŭ membroj de la anĝeva grupo el kiuj kelkaj aktive partoprenis : Geneviève kantis dum la spektaklo, Maurice registris, Pierre helpis pri la tekniko...

La loka grupo unue proponis amikan akceptadon kun trinkaĵoj, kukoj, prezentado de revuoj, dokumentoj diversaj. Poste ni tagmanĝis kun tridek partoprenantoj el kvar aliaj departementoj (72 - 44 - 53 - 37) en tre bona restoracio (« La table d'Owen »). Aliaj devis prepari la spektaklon kaj piknikis...

Posttagmeze okazis kune kun la esperanta aranĝo, kristnaska festo por la asocio «Secours Catholique». En la salonego « Pierre Guédou » ĉeestis do proksimume du cent personoj kaj infanoj !

Unue, tiu asocio proponis teatraĵon pri kristana temo. Plu raj personoj diversaĝaj partoprenis.

Poste komenciĝis la spektaklo «Ĉirkaŭ Karmeno» lastfoje prezentita de la Esperanta kant-grupo «INTERKANT'».



La publikon ĉarmis la spektaklo





La ĉefa solistino Zdravka Le Nepveu

Sur scenejo staris proksimume tridek kvin gekantistoj ruĝe kaj nigre vestitaj. Laŭvice viro (Sébastwien Erhard) kaj virino (Franjo Lévêque, ĥorestrino) prezentis la kuntekston kaj gvidliniojn por kompreni tiun francan operon sub hispana influo, komponita de Georges Bizet (1875).

La koruso kantis plurajn kantojn kun la ĉefa solistino, Zdravka Le Nepveu kaj kelkaj infanoj. De tempo al tempo dancis kvar virinoj kun andaluziaj kostumoj.

## *La Journée Zamenhof au Mans*

### *dimanche 15 décembre 2013*

Sous un ciel bleu, neuf membres du groupe espéranto d'Angers ont participé à cette rencontre, parmi lesquels certains participèrent activement : Geneviève a chanté durant le spectacle, Maurice enregistrait, Pierre aidait pour la technique...

Tout d'abord, le groupe local offrit un accueil amical avec boissons, gâteaux, présentation de revues, documents divers. Ensuite, nous avons déjeuné avec trente participants de quatre autres départements (72 - 44 - 53 – 37) dans un très bon restaurant ("La table d'Owen"). D'autres ont dû préparer le spectacle et pique-niquer...

En après-midi a eu lieu, en même temps que l'organisation espérantiste, la fête de Noël de l'association "Secours Catholique". Dans le grand salon "Pierre Guédou" étaient donc présents approximativement deux cents personnes et enfants !

En premier, cette association proposa une pièce de théâtre au thème chrétien. Plusieurs personnes, d'âges différents, participèrent.

Puis commença le spectacle «Autour de Carmen» présenté pour la dernière fois par le chœur espérantiste «INTERKANT'».

Sur scène environ 35 chanteurs et chanteuses vêtus de rouge et de noir étaient présents. A tour de rôle, un homme (Sébastien Erhard) et une femme (Franjo Lévêque, chef de chœur) présentaient le contexte et des repères pour comprendre cet opéra français, sous influence espagnole, composé par Georges Bizet (1875).

Le chœur chanta plusieurs morceaux de cet opéra avec la principale soliste, Zdravka Le Nepveu et quelques enfants. De temps en temps dansaient quatre femmes aux costumes andalous. Cependant, le plus dramatique épisode de cet opéra n'eut pas lieu (la mort de Carmen !).
De vifs applaudissements remercièrent tous les

Tamen ne okazis la plej drama epizodo de tiu opero (tio estas la morto de Karmeno !)
Varmaj aplaŭdoj dankis ĉiujn artistojn ! Ĉeestantoj almenaŭ aŭdis la Esperantan lingvon eĉ se, laŭ ni, antaŭa informo ne estis sufiĉa.
Tagfine, Esperantistoj kuniĝis cirkaŭ la artistoj (aparte Franjo, kiu nun haltigas sian estran funkcion) kaj salutis la personojn konatajn ĝis la venonta Esperanta evento !

*Fonto : Arlette Frangeul*
*Fotoj : Jeannine Daguin*



*Dum la tagmanĵo en restoracio*

artistes ! L'assistance, au moins, a entendu la langue espéranto, même si, selon nous, l'information préalable ne fut pas suffisante.

En fin de journée, les espérantistes se réunirent autour des artistes (particulièrement de Franjo qui maintenant met un terme à sa fonction de chef de chœur) et saluèrent les personnes connues jusqu'au prochain événement espérantiste !

*Source : Arlette Frangeul*
*Photos : Jeannine Daguin*

# Vortareto por tiuj kiuj brikolemas...

**Vi posedas ilarkeston, sed ĉu vi scias kiel nomi ĝiajn ilojn ?**
**Vidu ĉi-sube kelkajn tradukojn eltiritajn de la "Teknika Vortareto de Greziljono" fare de Frederik Lauriol.**
**Ĝi estas elŝutebla el la retejo http://gresillon.org/ en la rubriko "dokumentoj".**



LA ANĜEVA FOLIO
LA FEUILLE ANGEVINE



# Provenca gazeto pri la enpanteoniĝo de Renée Triolle

Sud-francia loka gazeto pozitive informis pri la novaĵo, ke loĝanto de la regiono, Renée Triolle ekhavis altrangan distingon kune kun dek unu aliaj kolegoj el landoj Ĉinio, Japanio, Usono, Irano, Nederlando (fakte Belgio), Pollando, Islando, Danio, Rumanio kaj Hungario pere de la fakto ke edukado.net listigis ŝin en sia Panteono. La honorigo donis bonan eblon por ke Renée ankaŭ tiuokaze informu pri Esperanto kaj atentigu pri ties valoro en la eduka kampo, pri la reprezentiĝo de UEA ĉe Unesko.

*Fonto : Edukado.net - 2013/12/31*



ESPERANTO

**Renée Triolle reçoit une distinction**

La fondation internationale edukado.net vient de faire entrer douze enseignants d'espéranto au Panthéon des enseignants et leur délivrer un diplôme pour leur travail dans le domaine de l'éducation. Notre concitoyenne Renée Triolle partage cet honneur avec onze collègues de Chine, Japon, Etats-Unis, Iran, Pays-Bas, Pologne, Islande, Danemark, Roumanie et Hongrie. "Je suis très fière de cette distinction qui souligne mon engagement dans l'enseignement de la langue équitable espéranto, les manuels que j'ai écrits ou les livres grand public comme "L'espéranto" aux éditions Le Dauphin ou l'Assimil de poche". Rappelons que Renée Triolle représente Universala Esperanto-Asocio à l'Unesco qui par deux fois s'est prononcé en faveur de l'espéranto dont les buts coincident avec ceux de l'organisatio des Nations Unies pour la culture et l'éducation et la science.

→ Pour plus de renseignements, esperanto.lacietat@wanadoo.fr ou esperanto-provence.org ; Cours au CIQ Fontsainte le mercredi de 17 à 19 h.

### Gazette provençale sur «l'entrée au panthéon» de Renée Triolle

Une gazette locale du Sud de la France a informé, positivement, sur la nouvelle qu'une habitante de la région, Renée Triolle, a obtenu une distinction de haut rang, en même temps que dix autres collègues de Chine, Japon, Etats-Unis, Iran, Pays-Bas (en fait Belgique), Pologne, Islande, Danemark, Roumanie et Hongrie. Il s'agit de son enregistrement par Edukado.net dans son panthéon. L'honneur rendu a donné une bonne occasion à Renée pour informer aussi au sujet de l'Espéranto et souligner la valeur de celui-ci dans le champ éducatif, ainsi que sur la place tenue par UEA à l'UNESCO.

*Source : Edukado.net - 31/12/2013*

# Maison Culturelle de l'Espéranto
## Château de Grésillon

### Programo 2014

**19-26 aprilo**
FRINGOJ, renkonto inter grupoj de Esperanto-lernantoj kaj iliaj instruistoj.

**26 aprilo - 4 majo**
PRINTEMPaS, intensivaj kursoj en 3 niveloj, internaciaj KER-ekzamenoj B1-C1.
*Rete : http://www.gresillon.org/printempo*

**8-11 majo**
Kantado de korusaro Interkant'

**11-17 majo**
Renkonto de rememoroj inter malnovaj esp-istoj kaj iamaj gastoj de Greziljono.
*Rete : http://www.gresillon.org/s1*

**29 junio - 6 julio**
Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj. *Rete : http://www.gresillon.org/s2*

**1-9 aŭgusto**
Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso.
*Rete : http://www.gresillon.org/s3*

**9-17 aŭgusto**
Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto.
*Rete : http://www.gresillon.org/s4*

**24 oktobro - 1 novembro**
AUTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.



**adreso**
MCE, Grésillon, St. Martin d'Arce, 49150 BAUGE-EN-ANJOU, France
**telefono**
02.41.89.10.34
**retpoŝto**
kastelo@gresillon.org

**(sekvo de la paĝo 1)**

## La gravitation fait fonctionner une nouvelle lampe

Les lampes à pétrole sont encore utilisées dans les régions pauvres, peu denses et sans réseau électrique. Elles sont un grand problème, car néfastes pour la santé de l'homme et de l'environnement.
Une entreprise nouvellement créée propose une solution qui utilise une source d'énergie plus verte. Il s'agit de quelque chose que nous avons tous en abondance : la gravitation.
On a construit une lampe qui se nomme "GravityLight". Elle éclaire par le pouvoir de la gravitation. Pendant qu'un poids tombe lentement, il tire un câble par le milieu de l'appareil et fait tourner une petite turbine. Cela convertit l'énergie du poids qui tombe, en électricité pour la lumière. Elle fonctionne de la même manière qu'une lampe de poche avec turbine manuelle. Il suffit de seulement quelques secondes pour remettre le poids. Pendant qu'il descend, suffisamment d'électricité est générée pour faire fonctionner une lampe pendant trente minutes. Contre un seul relevage chaque demi-heure, la lampe fournit une lumière écologique constante, sans batterie.
Des appareils similaires tels que des chargeurs de batteries pourraient aussi recevoir de l'électricité par la même méthode.
Les inventeurs ont dit qu'il est déjà possible de vendre les appareils pour moins de dix dollars. L'achat serait amorti dès trois mois après l'abandon de la lampe à pétrole. Le groupe a déjà dépassé son objectif d'investissement, donc nous pouvons espérer voir bientôt ces lampes devenir réalité.

*Source : Radioverda.com*

# *Elŝutu senpage la novvestitan revuon Esperanto*




***La revuon Esperanto de UEA ekde la januara numero kompilas nova redaktoro, Fabrício Valle. Tiu numero de la Revuo estas jam finredaktita, nun ĝi estas presata kaj atingos la abonantojn en papera formo en januaro.***
***La redaktora ŝanĝo ĉi foje signifas ankaŭ okulfrapan ŝanĝon de la ekstera aspekto kaj ankaŭ enhave la redaktoro celis fari la oficialan organon de UEA vigla kaj leg-invita.***
***Por ke ĉiu ajn Esperantisto povu konatiĝi kun la plursence freŝa revuo, la januara numero estas libere elŝutebla ĉe:***
***http://www.uea.org/revuo/index.html***
***Kvankam temas pri la unua numero de la jaro 2014, Fabrício Valle nomas ĝin sia "nula" numero, kiu estas ankoraŭ iel eksperimenta kaj eble ne libera de malglataĵoj. Li pensas, ke necesos ses numeroj, ĝis la revuo firme trovos sian vojon enhave kaj aspekte, kaj volonte la nova redaktoro akceptus ĉiaspecan kontribuon, rimarkon, proponon en la novestablita forumo de legantoj ĉe : https://plus.google.com/u/0/communities/101994865936702585531***

*L.Szilvási / Ret-Info*

## Ni ludis

N° 17

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1 | KLEMENTINO | A | KLEPTOMANI |
| 2 | LUKAN - RUAN | B | LUPO - LI - EL |
| 3 | EPILOGO - SD | C | EKIPI - NTR |
| 4 | POPO - EVAKU | Ĉ | MALOBSERVI |
| 5 | IBERIO | D | ENO - EURO |
| 6 | OL – SUM - RE | E | GERMANA |
| 7 | MINERALIGI | F | TROVI - KM |
| 8 | TRON | G | IU - AORISTO |
| 9 | NERV - AKTOR | Ĝ | NASK - EG - OR |
| 10 | IL - IO - MORT | H | ONDUM - IURT |

## Ni ludas

**Horizontale :**
1) Frazo legebla en ambaŭ direktoj
2) Artropodo, kiu kaptas insektojn per reto – Franda bakaĵo (sf)
3) Signo uzata por apartigo de frazelementoj (sf)
– Kurado sen vokaloj ! – Ĉina mezurunuo (sf) !
4) Plej alta titolo inter la regnestroj (sf)
5) La kvina litero – Trinkparoladeto
6) Skribaĵo aŭ bulteno per kiu oni donas novaĵojn (sf)
7) Tavolo de la terkrusto (sf) – Kodo kaŝita !
8) Ili transformas iun energion en mekanikan energion
9) Sufikso montranta "inklinon al" – Blankiĝanta pro manko de sunlumo (sf)
10) Tempodaŭro – Elmeti al granda varmo

**Vertikale :**
A) Dikhaŭtuloj
B) Agrabla plantodoro – Osto sen medolo !
C) Vitra ujo entenanta lumfonton (sf) – Haŭtflaviga malsano (sf)
Ĉ) Estaĵo de id-naska sekso (sf) – Sicilia vulkano (sf) – Germana fizikisto
D) Insekto kiu enterigas kadavretojn por kaŝi siajn ovojn (sf)
E) Novtera platfunda boato – Centono de la skandinavia krono (sf)
F) Miĉiganurbo
G) Cifero – Malsupra parto de la terkrusto – Finaĵo de la preterito
Ĝ) Granda nedifinita kvanto el tuto (sf) – Ne inteligenta homo (sf)
H) Li apartenas al la eklezia hierarkio (inv) – Pronomo

**N° 18** (sf) : sen finaĵo (inv) : inverse Ŭ = U

| | *A* | *B* | *C* | *Ĉ* | *D* | *E* | *F* | *G* | *Ĝ* | *H* |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| *1* | | | | | | | | | | |
| *2* | | | | | | | ■ | | | |
| *3* | | | | ■ | | | | ■ | | |
| *4* | | | | | | | | | | |
| *5* | | | ■ | | | | | | ■ | |
| *6* | | ■ | | | | | | | | |
| *7* | | | | ■ | | ■ | | | | |
| *8* | | | | | | | | ■ | | ■ |
| *9* | | ■ | | | ■ | | | | | |
| *10* | | | | | ■ | | | | | |

*Ludigas nin Gérard Musset*

# KALENDARO

## Selektitaj renkontoj / staĝoj / kongresoj

**8 - 15 marto**
21-a Korusa Semajno ĉe Pireneoj - en La Bastide-sur-l'Hers, **FRANCIO**. Ni ĉiutage kantos 5 horojn kaj povos plie turismi, debati, ludi, traduki, lerni E-on laŭplaĉe, ev. skii kaj krome pluraj partoprenontoj ankaŭ folkmuzikemaj alportos siajn instrumentojn por eventuale ludi kun lokuloj : Gérard, Patrick, Alyson & aliaj. Inf. Tut-Pirenea Esperanto-Koruso, Jorgos Esperanto - Le Village - FR - 11 420 Lafage, Francio.

**8 - 15 marto**
Mediteranea Esperanto-Semajno, MES-2014 - en restadejo Val d'Esquiere - Les Issambres ĉe la Lazura Marbordo, **FRANCIO**. Ĉu vi ankoraŭ frostas en via regiono ? Tuj venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj ! Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro... Rete : prezmoni@hotmail.com, tel. 0033 (0)4 94 83 06 88 - aŭ kris_grai@hotmail.fr

**24 - 26 marto**
Irana Esperanto-Kongreso (IREK) en Tehran, **IRANO**. La Unua Irana Esperanto Kongreso kun la temo : "Esperanto : lingvo de Ideo kaj Idealo". Rete: info@espero.ir

**5 - 10 aprilo**
7-a Mezorienta Esperanto-Kunveno - en Tbilisi, **KARTVELIO**. Belega lando... bonega etoso... Renkontiĝo de esperantistoj el mezorientaj landoj kun prelegoj, ekskursoj, artaj aranĝoj. Homoj povas veni antaŭ aŭ post la kunveno kaj ili povas pasigi tempon en Kartvelio (ni gvidos ilin tra Kartvelio laŭeble...). Konkurso pri la libro: "Kavaliro en la tigra felo". Rete : mezorienta.kunveno@esperanto.org

**26 aprilo - 3 majo**
3-a PRINTEMPaS - en Baugé, **FRANCIO**. Intensaj kursoj en 3 niveloj kaj internaciaj KER-ekzamenoj B1, B2, C1 en Esperanto-kastelo Greziljono. Rete: kastelo@gresillon.org

**14 - 21 aprilo**
Printempa Semajno Internacia - en Xanten, **GERMANIO**. Printempa kunveno kun ekskursoj, prelegoj kaj kursoj por plenkreskuloj kaj infanoj. Rete : petra.dueckershoff@esperanto.de

**16 - 22 aprilo**
Internacia Junulara Festivalo, IJF-2014 - en Castelsardo, insulo Sardio, **ITALIO**. Tradicia junulara printempa aranĝo en la antaŭpaska semajno. Ĉu vi volas havi en aprilo agrable varman veteron apud la maro ? Inf : ijf.admin@esperanto.it

**19 - 26 aprilo**
5-a Fringoj por infanoj - en Baugé, **FRANCIO**. Ferio-semajno kun por infanoj 8-17 jaraj, akompanataj de siaj instruistoj aŭ gepatroj en Esperanto-kastelo Greziljono. Rete : kastelo@gresillon.org



**30 aprilo - 4 majo**
Ekumenaj Bibliaj Tagoj kun "Adoru" - en Tuchomerice ĉe Prago, **ĈEHIO**. Prelegoj pri Bibliaj temoj, E-lingvaj liturgioj, preĝoj kaj kantoj el Adoru, amika kunestado, vizitado de Prago (ankaŭ) laŭ ekumena vidpunkto. Rete : stefanlepping@gmx.de

**1 - 4 majo**
73-a Hispana Kongreso de Esperanto kaj 18-a Andaluzia Kongreso - en Ronda, **HISPANIO**. La temo de ĉi kongreso estas Esperanto kaj flamenko, kun hispanaj kantoj kaj dancado. Rete: kongreso@esperanto.es

**1 - 10 majo**
26-a Aroma Jalto - en Jalto, **UKRAINIO**. E-festivalo kies celo estas plialtigi lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun belega naturo de Krimeo. Rete : volodomir@ukr.net

**11 - 16 majo**
Printempa Migrado - en Dijon, **FRANCIO**. Migrado en Burgundio tra famaj vinplantejoj kaj naturaj medioj ĉirkaŭ Dîjono por ĝuemaj esperantistoj. Rete : obuisson@live.fr

**11 - 17 majo**
Renkonto de rememoroj kaj rakontoj - en Baugé, **FRANCIO**. Malnovaj e-istoj aŭ iamaj gastoj de Greziljono rakontas siajn anekdotojn, pri Greziljono kaj Esperantujo; oni kune verkas belan tekstaron por eldoni ĝin kiel Kultura Kajero. Rete : kastelo@gresillon.org

**17 - 24 majo**
Kongreso de IFEF, Internacia Fervojista Esperanto-Federacio - en San Benedetto del Tronto, **ITALIO**. Rete : vitorni@virgilio.it.

**28 junio - 5 julio**
50-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj - en Jelgava, **LATVIO**. La plej populara Esperanto-aranĝo en Baltiaj landoj. En la programo: diversnivelaj Esperanto-kursoj, enkonduka kurso en latvan lingvon, Somera Universitato, Sankta Meso en Esperanto, Interkona, Nacia kaj Internacia Vesperoj, riĉa kultura programo, duontagaj kaj tuttaga ekskursoj, kvizoj, filmoj, kantoj, dancoj. Rete : margarita.zelve@gmail.com

**29 junio - 6 julio**
4-a Turisma semajno - en Baugé, **FRANCIO**. Tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj, gvidataj de profesia ĉiĉeronino en Esperanto. Rete: kastelo@gresillon.org

## *Pensaĵoj*

**Simpleco estas la finfina rafiniteco.**

La simplicité est la sophistication suprême. *(Léonard de Vinci)*

*Conclusion : l'espéranto est la plus sophistiquée des langues.*

**Kial oni facile farus, kiam oni povas fari komplike ?**

Pourquoi faire simple quand on peut faire compliqué ?
*(Les Shadocks)*

*Conclusion : Pourquoi utiliser l'espéranto alors qu'on peut se compliquer la vie avec l'anglais ?*

## *Humuro*

**Okulferma subskribado**

Post hejmenreveno de la lernejo, Pierre demandis sian patron:
"Ĉu vi povas skribi vian nomon kun fermitaj okuloj?"

"Kompreneble," respondis la patro.

"Bonege ! Bonvolu do subskribi mian lerno-notan kajeron."

### Nous contacter

**Centre Culturel Angevin d'Espéranto**
41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers
Tél. 02 41 73 17 97 - Courriel : info@esperanto-angers.fr

### Vous informer

**www.esperanto-angers**
www.esperanto-france.org, www.esperanto-jeunes.org
www.uea.org, www.esperanto.net

Kunhelpis al tiu eldonaĵo : Geneviève Gourichon, Jean-Yves Grille, Pierre Jagueneau, Jeanik Marolleau, Gérard Musset, Laurent Vignaud.